

EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 69. Decembro 7, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Frank Lappe.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 348 KB. Alkroĉaĵoj: 266 KB. Sume: KB 654.

La Kongreso de ILEI en 2024 okazos en Brazilo

Unuafoje la 57-a Kongreso de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Brazilo, en la bela, turisma urbo Maceió en la brazila nordoriento. Konata kiel 'Rideto-Urbo' (Cidade Sorriso) pro la popolo ĉiam ridetanta kaj 'Akva Paradizo' (Paraíso das águas) pro tio, ke ĝi estas ĉirkaŭata de lagetoj, riveroj kaj la Atlantika Oceano, Maceió troviĝas inter la urboj plej vizitataj de turistoj enlandaj kaj eksterlandaj. Kun ĉirkaŭ 40 kilometroj da strandoj kun mirindaj plaĝoj kaj naturaj naĝejoj, Maceió kaj najbaraj urboj atendas vin kaj viajn familianojn por ekskursi kaj ĝui diversajn aktivaĵojn kaj dum la vesperiĝo admiri spektaklajn sunsubirojn sidante ĉe kioskoj kaj trinkante kokosakvon kaj manĝante tipajn frandaĵojn. Hoteloj kaj gastejoj por ĉies gustoj abundas kaj multaj, fronte al la oceano, restigas turistojn kaj revenigas ilin al Maceió pro la ravantaj pejzaĝoj. La urbo jam gastigis du naciajn kaj du junularajn kongresojn. La 57-a ILEI-kongreso estos la unua internacia Esperanto-evento ĉi tie kaj ni esperas, ke ĝi estos mirinda kaj neforgesebla ne nur por vi, kiuj kunsidos kun ni dum prelegoj, debatoj, atelieroj, konversaciaj rondoj kaj aliaj programeroj, sed ankaŭ por viaj familianoj kaj geamikoj neesperantistaj. Bonvenon al Maceió! La 'Akva paradizo' atendas vin! Informis Laura Brazzabeni, kongresoj en ILEI.

Laŭ Internacia Pedagogia Revuo 2023/4, p. 52.

SMG: La loko kaj allogaĵoj de Maceio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Macei%C3%B3>

Pri la enhavo de IPR 2023/4 (Jarkolekto 53)

- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI)
- Sara Konnerth, Renardo Fössmeier: Esperanto en la universitato de Sibio
- Augusto Casquero, 1945 – 2023. Nekrologo verkita de Dennis Keefe
- Mónika MOLNÁR: Unika projekto kun konkretaj rezultoj
- László SZILVÁSI: Lingvolernado per danc-tapiŝoj
- Intervjuo kun Maximiliano Garcia (Alessandra MADELLA)
- Petr CHRDLÉ: Mia vivo kun Esperanto (fragmentoj de lia libro)
- A. MADELLA La Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato dekjariĝas
- Alessandra MADELLA: Pri la novaj lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI

- El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, CN, DE, HU, JP, HR, PL, RS)
- Stefan MacGILL: La fruktoj de agado per unu simpla komputilo
- Katalin KOVÁTS: Voĉdonu por la retaj ekzamendatoj de KER
- Leterkesto (reago de Gerald TUCKER)
- Redakciaj Informoj pri ILEI

Sur la titolpaĝo: Grafikaĵo de la 57-a Kongreso de ILEI – Maceió 2024

Sur la dorskovrilo: Unika projekto kun konkretaj rezultoj (vd. p.16)

Zamenhof-taga programo pere de Italio kaj ILEI

La 12-an de decembro 2023 ekde 21:00 (UTC +1) Itala Esperanto-Federacio atendas ĉiujn el ĉiuj landoj partopreno en la Zoom-evento okaze de la Zamenhofa-tago. Prelegos por ni **Zlatoje Martinov** (el Serbio), verkisto, tradukisto kaj literatura kritikisto.

Estos klera kaj festa momento por ankaŭ havi eblon fari demandojn.

Jen la ligilo en Zoom: 875 9921 4235; pasvorto: 319406.

Laura Brazzabeni

Kato en la konkurso

Nia kato – Kajto - Kantoteksto de Tomas Frejarö. (UNUA premio en la Belartaj Konkursoj 2023) <https://youtu.be/95FypBhs2Ms>

mga

El la vivo de E.D. Krause

La forpasinta Erich-Dieter Krause estis konata leksikografiisto. Li verkis, interalie, ekde la 1960-aj jaroj Germana-Esperantan kaj Esperanto-Germanan vortarojn, kiujn eldonis *Enzyklopädie Leipzig*, Buske (Hamburgo) kaj Mondial (Nov-Jorko). En 2023 aperis lia Plena vortaro Germana-Esperanto en tri volumoj kun 2511 paĝoj. Tio estas la plej ampleksa vortaro iam ajn eldonita en Esperanto. Specialisto pri la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia), ĝis sia emeritiĝo en la jaro 2000 li laboris en la Orientazia Instituto de la Universitato de Lepsiko. Li publikigis vortarojn kaj lernolibrojn pri la indonezia lingvo, prelegis en pluraj internaciaj konferencoj pri problemoj de leksikografio de Esperanto kaj de la indonezia kaj publikigis artikolojn pri la influo de aziaj lingvoj al Esperanto. Longtempa membro de UEA, de la Akademio de Esperanto kaj de la redakta komitato de la fakrevuo Esperantologio / Esperanto Studies. Blanke publikigis en 2015 okaze de lia 80-jariĝo bibliografion de liaj verkoj en 'Informilo por Interlingvistoj'.

Universitata retgrupo

En la novembra kunpensado de laborantoj por esperanto en universitato ni aŭdis raporton pri la simpozio okazinta en la universitato de Sevilo kaj pri la sukceso de la kurso por universitataj profesoroj en la sama universitato. Laŭ mi **kurso de Esperanto en universitato por profesoroj** kaj ne por studentoj estas io unika en la mondo. Ĉu iu povas informi pri simila kurso ie ajn?

Sekvis detala raporto pri la kursoj de Esperanto en la malĉeesta hispana universitato UNED, kiuj malgraŭ la kosto trovis lernantojn kaj al kiuj nun la prizorgantoj pensas eĉ aldoni trian superan nivelon.

Pri Ĉinio ni eksciis pri la starigota kurso en la pekina universitato por fremdaj lingvoj kaj pri la festoj pro la dek-jariĝo de la muzeo de la universitato Zaozhuang.

Fine estis ankaŭ mallongaj intervenoj pri la aranĝo de prelegoj en Esperanto kaj en la persa en la universitato de Teherano kaj pri la okazaĵoj en la universitato de Giridhar Rao el Barato kaj de Antonio Leoni el Kostariko.

Renato Corsetti

Oni festas en kvar serbaj urboj

Alproksimiĝas la 15-a de decembro, Tago de la Esperanta Libro kaj naskiĝtago de Zamenhof. Esperantistoj en Serbio organizas ĉeestajn renkontiĝojn: la 7-an de decembro en Užice (Nacia Biblioteko, 13:00), la 15-an de decembro en Subotica (Urba Muzeo, 18:00), la 16-an en Beogrado (Biblioteko 'Milan Budimir'), kaj ankaŭ en Vršac. En Beogrado, antaŭ la programo okazos ankaŭ ekzameno (A2-nivela).

Aranka Laslo

La principoj de liberaj softvaroj

La *Free Software Foundation Europe* (FSFE) hodiaŭ publikigis filmeton en Esperanto pri 'Kio estas [libera programaro?](#)' ([malfermitkoda programaro](#)). La kvar liberecoj estas klarigitaj en malpli ol 3 minutoj. Libera programaro garantias al vi la kvar neprajn liberecojn kiel uzi, studi, kunhavigi kaj plibonigi la programaron. Ĉi tiuj rajtoj kiuj difinas programaran liberecon subtenas aliajn fundamentajn liberecojn kiel la libereco de esprimo, gazetaro, kaj privateco. Ni klarigas kial ĉi tio bonas kaj kion ĝi signifas. Komentoj aldonindas. Jen la ligilo al la filmeto:

<https://media.fsfe.org/w/1Py4dfQipa8G6Td48mnCyU>

Ricevita de Herman Deceunik

Ondo pri decembro

Antaŭ 115 jaroj, la 1-an de decembro 1908, forpasis Marie Léonce Vallienne (1854-1908), franca kuracisto, poeto kaj esperantisto, en Esperanto ofte nomata Henri Vallienne, aŭtoro de la pioniraj Esperanto-romanoj 'Kastelo de Prelongo' (1907) kaj 'Ĉu li?' (1908). La listo de Esperantaj jubileo kaj memordatoj por decembro 2023, kompilita de Aleksander Korĵenkov, estas legebla en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" <https://sezonoj.ru/2023/12/decembro-11/>

Pakistano komunikas

Aperis la decembra numero de 'Nia Esperanto', revuo de Multana Esperanto-Rondo (MER). La revuo aperas papere kaj rete. Abonprezo por 6 retaj numeroj (julio-dec. 2023) kaj 8 malnovaj numeroj (jan-aŭg 2021) estas € 3 al la UEA-Konto mero-t. Post pago, bv. informi nin ĉe saluton123@yahoo.com

Jawaid Eahsan, Ĝen. Sekr. de MER.

Brazilano renkontis Zamenhofon en 1910

Frato de la fama verkisto **Malba Tahan** estis bonega esperantisto, ĉu vi sciis? Li nomiĝis **J. B. de Mello e Souza** kaj tradukis diversajn materialojn, inter ili la kanton *Em nosso país*, verkitan de **Francisco Braga** (la aŭtoro ankaŭ de la brazila *Himno de la Flago*). Mello e Souza ricevis premion pri poezio en la 6-a Universala Kongreso de Esperanto, en *Washington*, Usono, kie li renkontis Zamenhofon. Li estis unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj havis la okazon renkontiĝi kaj paroli kun la kreinto de nia lingvo.

El la komuniko de Brazila Kolekto.

Juna Amiko kaj ILEI servas vin

Ekde la jaro 2005 aperis regule en *Juna Amiko* serio de partoprenigaj tekstoj kun la nomo 'Kvinokvizo'. Temas pri ŝerca rakonteto kun kvin ligitaj ekzercoj. Ni opinias, ke post dudeko da jaroj indas doni al tiu rubriko duan vivon. Ni nun alkroĉas la re-

redaktitajn versiojn de tiuj eroj. Tra la sekvaj EKO-komunikiloj ni pretigos kaj alirojn pli da tiaj eroj.

Korespondpetoj de flanke de junaj lernantoj

El Hispanio: Saluton, mi estas Juan Diego, instruisto en Andaluzio (Hispanio) kaj 6 studentoj inter 14 kaj 18 jaroj interesiĝas korespondi kaj/aŭ interparoli en Esperanto rete (per retpoŝtadreso aŭ *Telegram*) kun samaĝaj studentoj. Ili estas veraj komentantoj kaj havas taskon por projekto en studobjekto: unue konatiĝi, sin prezenti; poste, esplori pri aliaj kulturoj kaj junaj, kaj sociaj kutimoj, i.a., kun la korespondanto. Ili mem lernas Esperanton per esperanto12.net kaj kurso.com.br, kaj rajtas uzi *Google Translator*. Interesiĝantoj, bv. skribi al mi ĉe: jd.diazbautista@gmail.com

El Italio: Klaso en la tria jaro de la baza lernejo [ĉirkaŭ 8-jaraj infanoj] deziras korespondi en Esperanto rete aŭ letere kaj ankaŭ interparoli per *Zoom* kun samspeca klaso eksterlanda. La klaso estas en la urbeto Verdello [verdelo] en norda Italio. Interesiĝantoj bonvolu kontakti Maria Galizzi: <m.galizzi@alice.it>.

La dua perita de Renato Corsetti

Du-tema festado en Liaoning, Ĉinio

Reage al la propono festi la 75-an datrevenon de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj kunlige kun la Zamenhof-tago, nia klubo decidis, ke la du festoj okazu en la 8-a de decembro, kaj aranĝis ĝin en granda komerca centro por efika diskonigo. Tiam pli multaj neesperantistoj (klientoj) surloke spektos nian prezenton. Ni plenumis por la du festoj la necesajn preparojn, ekz. faron de la tema transversa tuko (vidu sube).

La 164-a Naskiĝtago de D-ro Zamenhof kaj la 75-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj
柴门霍夫博士诞辰164周年及《世界人权宣言》75周年

Frank Lappe aldoniĝas al la kontrolistoj de EKO

Mi estas Frank Lappe el Frankfurto ĉe Majno (Germanio), konata kiel Frank el –furto :-). Mi ĝojas kontribueti al ĉi grava informilo per kontrollegado. Mi esperantistiĝis en 2016 kaj membriĝas en la loka frankfurta Eo-klubo, UMEA, ILEI, kaj kompreneble en UEA. Hobbies: Esperanto, beletro, tradukado, glisparaŝutado. Mi antaŭĝojas renkonti kiel eble plej multe da samideanoj en 2024 en Tanzanio.

===== vortoj: 1495 =====



La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60).

La Komunikilo iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@protonmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedistoj.